FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie

- N° 42 - - Décembre 1957 -

Redaktas M. HUET, 63 Boulevard François 1er, LE HAVRE - Seine-Mme


# KONGRESO


LE HAVRE, 17/18-ajn de MAJO 1958

-----oOo-----

Honorkomitato.- S-ro Urbestro de Havro, Deputito de Mara-Sejno (Prezidanto)
S-ro Prezidanto de "Syndicat d'Initiative"
S-ro Prezidanto de Havra Komerca Ĉambro
S-ro Marcel BOSC, Honorprezidanto de U. E. N.
S-roj GASSE (Le Havre), STRUB (Sotteville-lès-Rouen), S-ro SAGET (Elbeuf)

Kongreskomitato.- Prezidanto: S-ro HUET; Vicprezidantino: F-ino AMIARD; Sekretariino: S-ino LAVALLEE; Helpsekretariino: F-ino VINCENT; kasisto: S-ro LESTERLIN.

(vidu la programon sur la malantaŭa paĝo)



HAVRO - Foch Avenuo.

## PROGRAMO DE LA KONGRESO

Sabato 17-an de Majo.- Salle Municipale, 44 Rue Jules Lecesne, je 20 h. 30

PUBLIKA PRIPAROLADO PRI ESPERANTO

Prelegos la dinamika Direktoro de "Centre national Esperanto-Office" en Orléans. Dum tiu prelego, oni vidos lumbildojn kaj aŭdos la voĉojn de diversaj eminentuloj surdiskigitajn.

Dimanĉo 18-an de Majo.- Salle de la Lyre Havraise, 44 rue Jules Lecesne (1-a etaĝo)

9. 45.- Malfermo de la Kongreso
- Laborkunsido

12. 15.- Akcepto de la Urbestro al la K. K. kaj estraro de U. E. N.
- Oficiala fotografaĵo

12. 45.- Komuna tagmanĝo ĉe "Hôtel de France et de Bourgogne", Cours de la République 21. Prezo: 700 Fr (ĉiuj kromelspez.enkalkulitaj)

14. -- VIZITO DE LA URBO AŬTOBUSE
Ni devas klarigi ke, dum tri horoj, la Kongresistoj vizitos la tutan urbon kaj l'havenon. Survoje, je ...

... 15. 30.- INAŬGURACIO DE STRATO ZAMENHOF
sub efektiva prezideco de S-ro Urbestro de Havro.

---

La Komitato esperas ke ĉiuj normandaj Esperantistoj volos partopreni tiun Kongreson, kies distran parton li ne forgesis. Oni bonvolos, tiel rapide kiel eble, sendi la kotizon: 400 Fr (kiu enkalkulas la prezon de la peraŭtobusa vizito) al la kasisto: S-ro LESTERLIN, 136 rue du Bois-au-Coq, LE HAVRE-GRAVILLE - C/C.Postal: 849-74 ROUEN.

Les Congrès régionaux doivent être des réunions efficientes, c'est-à-dire que des décisions concrètes doivent être prises pour l'avancement de l'Esperanto en Normandie. Nous vous prions d'étudier très soigneusement les projets que vous désirez voir inscrire à l'ordre du jour, qui sera présenté dans le prochain numéro du bulletin.

* * * * *

## KOTIZOJ POR 1958

U. N. E. + Normanda Bulteno: 100 Fr
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE, 35 rue de Bayeux, CAEN. C/C.P: ROUEN 283-40
ATENTU! Nur la Membroj pagintaj la kotizon ricevos la Bultenon!

U. E. F.- 1) Simpla Membro k "Franca Esperantisto": 600 Fr; 2) UEA Membro jarlibro (MJ) 1350 Fr; 3) MJ + revuo "Esperanto" (MA): 2100 Fr; 4) UEA M.subtenanto(MS)2850 Fr
UNION ESPERANTISTE FRANCAISE, 34 Rue de Chabrol, PARIS 10° - CCP: PARIS 855-35

---

G. E. E.- Kotizo k revuo "Esperanto et Culture" (en Français): 500 Fr (1)
(1) + internacia parto, Esperantlingve ........... : 800 Fr
Pagu al S-ro BIDOIT, 6 Rue de la Paix, BAUGE (M. & L.) - CCP: NANTES 143-867

---

S. A. T.- Sennaciulo .......... 600 Fr
Sennaciulo revuo ..... 780 Fr
Novaliĝanto pagu krome 40 Fr.
S.A.T. Amikaro, 67 Avenue Gambetta, PARIS 20°.

---

UNIVERSALA LIGO.- Abono al "LA PRAKTIKO" ........ laŭvole, sed minimume: 720 Fr.
Pagu al S-ro LABIT, 120bis rue Meurein, LILLE (Nord) - CCP: LILLE 1.709-29

* * * *

# Nia Vivo

FECAMP.- En nova gazeto "Fécamp-Presse", la grupo publikiĝas rubrikon "Le Coin de l'Esperanto. - Kvankam la urbkonsilantaro estas tre favora al Esperanto (tion, oni diras), la jara subvencio malaltiĝis de 3.000 ĝis 1.000 Fr. - Nia grupanino F-ino Suzanne MARAINE geedziĝis kun S-ro Léon DUVAL la 19-an de Oktobro. - Nia Sekretariino, F-ino Michèlé CORDONNIER foriris la 9-an de Decembro al Innsbrück, kie ŝi geedziĝos kun S-ro Adolf RUMESCH, aùstra samideano; al tiuj geparoj, niajn gratulojn, sed, ankaù, ĉar ili forlasas nin, niajn bedaùrojn.

EVREUX.- Propagando per artikoloj en gazetoj.

HONFLEUR.- Niaj gesamideanoj HULLIN ĵus festis sian edziĝan datrevenon (france: "noces d'or"). Niajn gratulojn! (Rue Dauphine, Honfleur, Calvados).


YVETOT.- F-ino Margareto FERCOQ, vundita dum aùtomobila akcidento, nune resaniĝis. Ŝi dankas la geamikojn, kiuj sendis al ŝi kuraĝigajn leterojn dum kiam ŝi devis restadi en hospitalo. (rue Pierre Lefebvre, Yvetot, Seine-Maritime).


SAINT-LAURENT-DE-BREVEDENT.- S-ro Alberto LETENDRE malfermis kurson en sia vilaĝo; li plene sukcesis ĉar, en St Laurent (978 enloĝantoj), kie ekzistis nur 2 Esperantistoj (li kaj lia edzino - nia ĉarma kasistino de U.E.N.- ) 20 gelernantoj regule sekvas la kurson. Niajn gratulojn!

SOTTEVILLE-lès-ROUEN.- Niajn gratulojn ankaù al S-ro Clément MARTIN kiu malfermis novan kurson ĉe "Ateliers Buddicum", kun 12 gelernantoj.

BAYEUX.- F-ino CHERIE organizis grandan publikan prelegon, kiun faris S-ro BENISTAN, inspektoro pri edukado; ni esperas ke la ĉambro estis plenplena je personoj.

CONGRES DU HAVRE
Sont en vente des séries de 3 vignettes de couleurs différentes. Les commander al la kongreskasisto (LESTERLIN). CCP. ROUEN, 849-74.
1 série de 3: 20Fr (+ 20 Fr pour frais d'envoi)
6 séries de 3: 100 Fr (+ 20 Fr frais d'envoi).





HAVRO, Jardin Saint-Roch.